

# La NASKa Fasko


Ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, ĉe UCSD

london, la 4-an de Julio, 2011 • numero tri

## Venontaj eventoj

### Lundo (hodiaŭ)

★ 9:00 - 11:30 atm: Lecionoj



★ 2:00 - 3:30 ptm:  
Kromlecionoj

★ 4:30 - 5:45 ptm: Ekskurso  
Promeno al la glisilejo

★ 7:00 - 8:00 ptm: Ludoj en la komuna  
ĉambro

★ 8:30 - 9:30 ptm: Ekskurso  
Promeno reen al la glisilejo por spekti  
fajraĵojn

### Mardo (morgaŭ)

★ 9:00 - 11:30 ptm: Lecionoj

★ 2:00 - 3:30 ptm: Kromlecionoj

★ 7:00 - 8:00 ptm: Vespera programo

### Merkredo

★ **Ekskurso-tago:** Libera tago por longaj ekskursoj al Sandiego. Kien vi volas iri? Ĉu ni ŝatas muzeojn? Ĉu vi volas viziti bestoĝardenon? Aŭ ĉu vi preferas simple promeni kaj butikumi en la urbo? Se vi havas preferon, sciigu al Hoss.

★ 7:00 - 8:00 ptm: Vespera programo?  
Se ni ne estas tro lacaj...

#### La NASKa Fasko

Redaktejo: Cuzco 117  
<nask.esperanto@gmail.com>

La NASKa Fasko estas ĉiutaga informbulteno de la kursaro. Trovu ĝin matene sur la pordo de nia komuna ĉambro en Cuzco.

Se vi volas kontribui mallongan artikolon, foton, ŝercon, bildstrion, leteron, poemon, am-leteron, ktp. bonvolu alporti ĝin al la redakitejo en Cuzco 117, aŭ – eĉ pli bone – sendu ĝin al <nask.esperanto@gmail.com>.

## Ekskursoj, ekskursoj...

Ĉe UCSD ni situas preskaŭ ĝuste apud la pacifika maro, kaj hodiaŭ ni faros du ekskursojn al la marbordo. En la posttagmezo ni iros tien por ĝui la belan etoson, kaj denove, post sunsubiro, por spekti fajraĵojn de la urbo *La Jolla*.




- Je 4:30 ptm ni renkontiĝos antaŭ la loĝejoj kaj ni promenos proksimume dek minutojn for al glisilejo (angle, *glider port*) kiu situas ĉe la rando de altaj, marbordaj klifoj. Ĉe la glisilejo vi povos sidi, aĉeti trinkaĵojn, ĝui la vere ravajn klifojn, kaj, kompreneble... spekti la glisilojn. (*Vidu foton malsupre.*) Se vi kuraĝas, vi povas eĉ glisi kun profesia instruisto. Nepre kunportu fotilon, se vi havas. La suno ofte brilas brule, do ne forgesu sunĉapelon kaj sunkremon. (Se vi bezonas sunkremon, ni havas kroman tubon en Cuzco 117.)

Apud la glisilejo ni vidos ankaŭ longan ŝtuparon kiu zigzagas malsupren al la plaĝo *Black's Beach*, tre ŝatata loko de surfistoj kaj naturistoj (senvestemuloj). Kvankam ni ne iros al la plaĝo, vi almenaŭ ekscios la vojon, do vi povos facile reveni poste, se vi volas.

- Je 8:30 ptm, post la sunsubiro okazos fajraĵoj en la apuda urbo *La Jolla* por festi la usonan tagon de sendependiĝo. La glisilejo estas bona loko por spekti la spektaklon, kiu komenciĝos je proksimume la 9-a horo. Renkontiĝu antaŭ la loĝejoj kaj ni iros grupe.

Se vi ne volos promeni, Ellen gvidos grupeton al la tegmento de la proksima konstruaĵo *Social Sciences*, de kie oni povos almenaŭ parte vidi la fajraĵojn.



# Aventuroj en Aviadiloj

De *Filipo DORCAS*

Elizabeto kaj mi venis al NASK en aviadilo de Teksaso, sed la aviadilo havis problemon. Antaŭ ol ni elteriĝis de la flughaveno DFW, la piloto anoncis per la aŭdilo, ke riparistoj trovis problemon en la klimatizila sistemo, kaj ke ni devas atendi la riparadon. Do, ni sidis en niaj seĝoj en la aviadilo unu horon sen malvarma aero. Post iom da tempo la piloto anoncis ke ili trovis la problemon kiam ili elprenis la kovrilon de la sistemo. Ili trovis ĉapelon en la aparato! La riparistoj elprenis la ĉapelon, remetis la kovrilon, kaj provis la sistemon. Ĝi funkciis. Tio ŝajnis strange al ni, ne nur pro la apero de ĉapelo en la internaĵo de granda aviadilo, sed ankaŭ ĉar tiu aviadilo ĵus alvenis de Sankta-Luiso! Kiel ĝi funkciis sufiĉe por flugi de alia urbo, paŭzi iom por pasaĝeroj eliri kaj eniri, kaj subite havi problemon kun iu ĉapelo en la klimatizilo? Pli kaj pli kurioze!

## Senintenca esperantaĵo?




Dankon al eksNASKano Simono Keith, kiu sendis al ni la foton.

# Kartludo: “bananagramoj”

de *Chris WINGROVE kaj  
Hoss FIROOZNIJA*

Pasintjare nia NASKano Chris ekhavis la ideon enesperantigi la lastatempe furoran anglalingvan vortludon *Bananagrams*. Kvankam ni ne havas la tegoletojn de la originala ludo (nek la ĉarman bananecan sakon), ni ja havas kartetojn kun literoj en la ĝusta distribuo de oftecoj, do ili supozeble funkcios tute bone. Jen nia provizora regularo. Ĉu vi volus eble provludi?



1. Metu ĉiujn kartojn meze de la tablo kun la vizaĝoj de la kartoj malsupren. Tiu amaso nomiĝas la *fasko*. Se ludas nur 2–4 homoj, ĉiu prenu el la fasko po 15 kartojn. Se ludas 5–6 homoj, ĉiu prenu po 10 kartojn. Se ludas 7 (aŭ pli), ĉiu prenu po 8. Ankoraŭ ne renversu la kartojn! Iliaj vizaĝoj restu malsupren.
2. Unu ludanto diru “Ek!” kaj tiam ĉiu renversu siajn kartojn kaj komencu fari **siajn proprajn** interkonektitajn “vortojn”. (Vortoj estu horizontalaj aŭ vertikalaj, kaj oni rajtas ŝanĝi ilin laŭdezire, sed ĉiuj vorto devas ligiĝi kun aliaj.) Ne estas vicordo: ĉiuj ludantoj konstruu vortojn samtempe.
3. Permesitaj “vortoj” estas radikoj, afiksoj, kaj memstaraj vortoj (ekz. “antaŭ”, “pli”, “preter”). Malpermesitaj estas kunmetaĵoj, vortoj kun gramatikaj finaĵoj, kaj propraj nomoj.
4. Kiam oni sukcesas uzi ĉiujn siajn literojn, tiu ludanto prenu unu novan karton el la fasko kaj diru “Prenu!” **Tiam ankaŭ ĉiuj aliaj ludantoj prenu po unu novan karton el la fasko**, aldonante ĝin al siaj kartoj.
5. Oni rajtas redoni al la fasko nedeziratajn kartojn, anoncante “Redono!” Tamen por ĉiu redonita karto, la redoninto **devas preni tri novajn kartojn**.
6. La ludo daŭros ĝis kiam restas malpli da kartoj en la fasko ol ludantoj en la ludo. Kiam oni uzas ĉiujn siajn kartojn, tiu krii “BANANOJ!” La aliaj ludantoj rajtas kontroli la kartojn de la krianto, uzante preferatan vortaroon. Se ĉiuj vortoj estas permesitaj, la krianto fariĝas la **gajninto de la rondo**. Tamen, se eĉ unu vorto estas malpermesita, la krianto fariĝas “putra banano”. La putra banano **ne plu rajtas ludi en la rondo**, kaj devas redoni ĉiujn siajn kartojn al la fasko. La aliaj ludantoj tiam daŭrigu la ludon.

### Eventualaj variaĵoj:

- Kunmetitaj vortoj kaj finaĵoj estu permesitaj.
- Ĉiujn kartojn oni dividi inter la ludantoj dekomence, kaj la tuta ludo okazu sen prenoj aŭ redonoj. Gajnas la unua ludanto, kiu uzas ĉiujn siajn kartojn. Se neniu povas uzi ĉiujn, gajnas tiu kun la malplej multaj neuzitaj kartoj.